Saint Helens

Monto Saint Helens troviĝas en Vaŝingtonio (Usono). La alteco de ĉi tiu aktiva vulkano de la Kaskada montaro atingis 2950 metrojn antaŭ ĝia erupcio en 1980. Ĝia nuna alteco estas 2550 metroj.

En majo 1792, Kapitano George Vancouver vidis la monton de la Puĝeta markolo. En oktobro 1793, dum li estis en sia ŝipo ĉe la buŝo de la rivero Kolumbio, li denove vidis ĝin kaj nomis ĝin por honori la ambasadoron de Lia Brita Moŝto ĉe la Kortego de Madrido, Barono Saint Helens, Alleyne Fitzherbert. Oni diras, ke la indiana nomo de la monto estis *Loŭala-klogh*, kiu signifas *fumantan monton*.

Neaktiva dum 120 jaroj, Monto Saint Helens violente erupciis la 18-an de majo 1980. Ĝi mortigis ĉirkaŭ 60 personojn kaj elsputis vulkanan plumon 18 300 m en la aeron. La erupcio kaŭzis fajrojn kaj kot-lavangojn, kaj kovris grandan areon per vulkana cindro. La vulkano kaj la ĉirkaŭaĵoj nun estas nacia monumento.

La 1-an de oktobro 2004, post multe da tertremetoj, Monto Saint Helens denove erupciis.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Saint_Helens